

Sud-Rejna Kuriero

Aprilo
2013

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°50

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

La ĉi-jara vintro daŭras longe, malgraŭ tia malfavora vetero ni sukcesis okazigi komence en februaro nian membro-kunvenon en Espace 110. Raporto aperas en ĉi-tiu numero.

Komence de marto nia grupo estis invitita de la dekano de la Universitato de Mulhouse por deĵori ĉe la festo de lingvoj. En la raporto vi malkovros novan artistinon, nome Marie Lieby.

Meze de marto pluraj niaj membroj povis ĝui la bone organizitan regionan staĝon en Benoîte Vaux. Refoje ni ĝuis la talenton de Marie.

La verdaj fadenoj iĝas simpatiaj kaj gajaj renkontiĝoj, kiuj ĉiam pli kaj pli allogas la partoprenantojn.

Dank'al iniciatoj de kelkaj niaj membroj, ekestas novaj planoj por nia grupo. Refoje ni partoprenos en "Vitarue" dum 10 sinsekvaj dimanĉoj. En decembro ni organizos la Zamenhof-feston.

Krome ni akceptis organizi la printempan staĝon en aprilo 2014 por nia regiona asocio Espéranto France-Est. Ĝi okazos en Storckensohn.

Mi deziras al ĉiuj agrablan printempon kaj interesajn okazojn por ĝui Esperanton.



Statuo de Ligier Richier en
Saint-Mihiel

André Grossmann

Programo 2013**ESPERANTO - SOCIETO BASEL**

Lunde	22.04.2013	Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
Ĵaŭde	23.05.2013	„Akropolis“ en Inzlingen/ekde la 19a.
Lunde	24.06.2013	Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“
FERIOJ		
Dimanĉe	25.08.2013	Ekskurso de Riehendorf al Inzlingen tra Rothengraben-Eiserne Hand-Buttenberg Rendevuo : 10a Riehen-Dorf (Tramhaltejo)
Ĵaŭde	26.09.2013	Ni parolos pri la somero en .Riehenring 129 (antaŭa salono)...Ek de la 20a15
Lunde	28.10.2013	Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
Ĵaŭde	14.11.2013	Programo en Riehenring 129 (antaŭa salono) Ek de la 20a15
Sabate	14.12.2013	Zamenhofa festo en Francio Nicole Bérout

Bavelo-Kalendaro 2013

	29.06.	Pirmasens(D) : Esperanto-Tago Rejnlando- Palatinato
09.-12.05.	Homburg/Saar(D): Kultura Semajnfino	21. aŭ 28.9. Soultzbach(F): komuna migrado en la Voge- zoj
11.05.	Ottenhöfen(D): BAVELO-migrado ĉe Achern	05.10., Lusse (F). Amika Tago en la budisma centro
17.-20.05.	Nurembergo(D) : 90-a Germana Esperanto- Kongreso	06.-11.10. Zell;Mosel(D): 3-a Aŭtuna Esperanto- migrado (EHW)
29.05.-02.06.	Möderbruck. Aŭstrio : „Blue floras la genciano“	18.-20.10., Speyer (D): 35-a BAVELO-Seminario kaj 74a staĝo de Espéranto France-Est
15.06.	Stuttgart (D) : Esperanto-Tago Baden- Virtembergo kun membro- kunveno BAVELO	

Pourquoi l'anglais ?**Warum auf Englisch ?**

D'où vient cette obsession pour l'anglais ? Pourquoi le débat resurgit-il régulièrement sur l'omniprésence de cet idiome dans notre système d'éducation, dans nos textes, sur nos ondes et dans la rue ? Simplement parce que l'anglais est devenu la „lingua franca“ de nos temps modernes, le véhicule de communication d'un monde globalisé. Plus de 1,5

Woher kommt denn diese Besessenheit für die Englische Sprache ? Warum erscheinen in regelmäßigen Abständen Debatten über die Allgegenwart dieses Idioms in unserem Bildungswesen, in unseren Texten, in unseren Medien oder auf der Straße ? Einfach weil das Englische die „lingua franca“ unserer modernen Zeit ist, das Kommunikationsvehikel einer globalisierten

millard de personnes parlent cette langue dans le monde.

Parce que l'anglais est facile ? Oui et non. C'est vrai qu'avec 800 à 1000 mots, on peut communiquer correctement. Mais l'anglais est aussi la langue qui comprend le plus de mots. L'Oxford English Dictionary mentionne plus de 500'000 entrées, le Petit Robert en a 60'000. L'anglais est plus facile dans un premier temps, après cela se complique... Pourquoi ? Parce que l'anglais est une langue d'immigration. Il a fallu la simplifier à l'extrême pour permettre à des émigrants peu formés de s'intégrer rapidement aux Etats-Unis ou en Australie.

La suprématie de l'anglais vient des deux puissances universelles qui se sont succédé : la Grande-Bretagne et les Etats-Unis. Après la puissance militaire et économique (les grandes entreprises parlent anglais), la puissance technologique prend le relais. Les ordinateurs parlent anglais, comme majoritairement internet ou la science en général. En 2007, les Etats-Unis ont publié 209'695 articles scientifiques auxquels il faut rajouter 47 121 articles britanniques. La France en publiait la même année 30 740 et la Suisse 9190, ce qui est pas mal vu notre taille.

L'anglais se modifie aussi très rapidement. Comme la plupart de ceux qui parlent anglais aujourd'hui ne sont pas, comme moi, de langue maternelle anglaise, nous avons tous déformé la langue originale pour qu'elle soit compréhensible de tous. Cet anglais „international“ simplifié est celui des entreprises d'aujourd'hui et nos enfants qui communiquent sur internet. Conséquence inattendue : Les Britanniques ou les Américains qui parlent trop bien leur langue ne sont désormais plus bien compris des autres. Ironie du sort et vengeance des gens simples...

Welt. Mehr als 1,5 Milliarden Personen sprechen diese Sprache in der Welt.

Weil Englisch einfach ist ? Ja und nein. Es stimmt, dass mit 800 bis 1000 Wörtern, man korrekt kommunizieren kann. Aber Englisch ist auch die Sprache mit den meisten Wörtern, das Oxford English Dictionary erwähnt mehr als 500'000 Einträge, der Petit Robert hat 60'000. Englisch ist zuerst mal einfacher, aber dann wird es schwieriger... Warum ? Weil Englisch eine Immigrationsprache ist. Man musste sie extrem vereinfachen, um den wenig gebildeten Emigranten zu erlauben, sich schnell in den Vereinigten Staaten oder in Australien zu integrieren.

Die Übermacht des Englischen kommt von den universellen Gesellschaften, die einander gefolgt sind : Großbritannien und den Vereinigten Staaten. Nach der militärischen und wirtschaftlichen Macht (die großen Konzerne sprechen englisch), tritt die technologische Macht die Nachfolge an. Die Computer sprechen englisch, so wie mehrheitlich das Internet oder die Wissenschaften im allgemeinen. Im Jahre 2007, haben die Vereinigten Staaten 209'695 wissenschaftliche Artikel publiziert, denen man noch die 47'121 britischen Artikel hinzufügen muss. Frankreich veröffentlichte im gleichen Jahr 30'740 Artikel, die Schweiz 9190, was für diese Landesgröße nicht schlecht ist. Englisch verändert sich sehr schnell. Weil die Mehrheit von denen, die englisch sprechen, wie ich, keine englische Muttersprachler sind, haben wir alle die Originalsprache verunstaltet, damit sie für alle verständlich werde. Dieses „internationale“ Englisch ist das der heutigen Betriebe und der Kinder, die auf dem Internet kommunizieren. Unerwartete Folge : Die Briten und Amerikaner, die ihre Muttersprache zu gut sprechen, werden von nun an nicht mehr gut von den anderen verstanden werden. Lange Nase des Zufalls und Rache der einfachen Leuten...

Stéphane Garelli/Uni Lausanne

Agad-raporto de Mulhouse-Espéranto por la jaro 2012

En Espace 110 nia grupo disponas pri salono ĉiun mardon vespere de la 18a30 ĝis la 20a. Tie dum la tuta lernojaro okazas la kurso por progresantoj kun 5 gelernantoj.

Tiu salono estas ankaŭ uzata por okazaj renkontiĝoj aŭ festetoj.

Jam en januaro ni invitis niajn membrojn kaj najbarajn samideanojn partopreni la tri-reĝan feston tie. Ĝi okazis la 10an de januaro. Same la Ĝenerala Membro-Kunveno okazis sam-loke la 7an de Februaro.

Krome dum la jaro regule funkciis la lundaj babil-kunvenoj, nomataj verdaj fadenoj en restoracio, alterne en Mulhouse kaj en Saint-Louis, tiam ankaŭ partoprenas membroj el Bazelo. .

Refoje ni estis invititaj partopreni la feston de lingvoj en la universitato de Mulhouse, en la fakultato de Beletro la 7an de marto.

Dank'al propono de Bertrand Wick, nia grupo organizis la 71an regionan staĝon en La Petite Pierre la 23-25ajn de marto.

Alia propono venis de Yves Stutz, partopreni de la 20a de majo ĝis 22a de julio en "Vitarue". Ĉe la bordo de la rivero Ill, iuj membroj deĵoris ĉiudimanĉe de la 10a30 ĝis la 12a30 por babili kun la preterpasantoj kaj informi pri Esperanto.

La jarfina fest-manĝo okazis en Village-Neuf, en restoracio apud la Rejno la 7an de julio.

Niaj amikoj en Frajburgo proponis agrablan amikan tagon la 18an de aŭgusto, simple por viziti, promeni kaj amike kune babili kaj ĝui Esperanton.

En septembro en Colmar, Fernando kune kun aliaj afrikanoj instigis la samideanojn partopreni lingvan festivalon kun partopreno de ne-esperantistoj.

Cyrille Hurstel prelegis en la universitato, sed pro nesufiĉa nombro da enskribitaj studentoj la Esperanto-kurso ne povis okazi.

En oktobro komenciĝis la kursoj kun 5 progresantoj en Espace 110, dume Jacques klopodis ĉe la "Mondcivitanoj" informi kaj iniciati kurson.

La 17an kaj 18an de novembro nia grupo sukcesis deĵori ĉe Bédéciné en Espace 110 kaj samtage ĉe foiro pri ekologio kaj justa komercado en Ungersheim..

La 15an de decembro, la Zamenhof-festo estis organizita en Frajburgo kun vizitoj, prelegoj, kaj komuna manĝo.

SRK aperis 4 foje jare.

Nia retejo <http://mulhouse.esperanto.free.fr> daŭre informas pri la diversaj aktivecoj de nia grupo, kaj ankaŭ de la regiono. Nun estas konsultebla en ĝi nia biblioteko.

Nia dissendo-listo mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr rezervita al niaj membroj, refoje montris sian utilecon por rapide kaj akurate informi pri lokaj eventoj.

Nia Ĝenerala Asembleo

La Ĝenerala asembleo okazis en la espace 110 la 5an de februaro 2013 . Ĉeestis s-inoj Simone Kiry, Denise Heinrich, kaj s-roj André Grossmann, Edmond Ludwig, Jacques Pineda, Frédéric Porretti, Yves Stutz kaj Bertrand Wick.

La last-jara raporto verkita de nia sekretario Frédéric Porretti aperis en la numero 46 de SRK, ĝi estis unanime akceptita,

La sekretario ankaŭ prezentis la kompletan agad-raporton de la jaro 2012. La prezidanto prezentis la financon raporton de 2012 kaj liston de membroj kaj abonantoj de la nuna jaro 2013

Ambaŭ raportoj estis unuanime aprobitaj.

Finiĝis la mandato de jenaj komitatanoj : Frédéric Porretti, Simone Kiry, kaj Jacques Pineda. Simone Kiry ne rekandidatiĝis, akceptis kandidatiĝi Yves Stutz. Ĉiuj estis unuanime elektitaj.

La nova komitato elektis la estraron por la jaro 2013. Ĝi estas jena:

Prezidanto:	André Grossmann
Sekretario por la franca:	Robert Kueny
Sekretario por Esperanto :	Yves Stutz
Help-sekretario	Frédéric Porretti
Kasista funkcio:	André Grossmann
Help-kasisto:	Bertrand Wick
Eksteraj rilatoj kaj propagando:	Jacques Pineda

Pluraj aktivaĵoj de la jaro 2012 bone funkciis, tial ni volonte daŭrigu ilin por 2013. Festo de lingvoj en la Universitato la 9an de marto. La lundaj kunvenoj Fadenoj laŭ iniciatoj de Bertrand kaj Jacques, Vitarue laŭ la propono de Yves. Ankaŭ ni nepre partoprenu en Ungersheim, Bédéciné.

Por ebligi al ĉiuj lernantoj povi partopreni la kurson por progresantoj, estis proponitaj ĝin okazigi alterne marde posttagmeze kaj vespere.

Nia asocio havos la taskon organizi la Zamenhof-feston. Jacques proponas ĝin okazigi en restoracio ĉe "Fonderie" Eventuale ni invitos artiston por la vespero.

Ekestis propono doni la eblecon ricevi nian bultenon SRK en reta versio anstataŭ papera. La membroj povas libervole elekti unu aŭ alian. Jam ĉi-tiu numero estas tiel sendata.

Festo de lingvoj en la Universitato de Alta Alzaco en Mulhouse marto 2013



Refoje la dekano de la Universitato de Alta Alzaco, Yann KERDILES invitis nian asocion partopreni la feston de lingvoj. Ĝi okazis ĉi-jare la 8an de marto en la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Socialaj Sciencoj de Mulhouse. Ĉi-foje ĉiuj lingvoj troviĝis en la



salono de la ter-etaĝo, certe pli trankvila ol la supra etaĝo.

Deĵoris ĉe la tablo Edmond Ludwig, Yves Stutz, Bertrand Wick kaj André Grossmann.

En la mateno okazis deklamadoj, skeĉoj kaj muzikaj prezentadoj en diversaj lingvoj, ĉu en la instruataj lingvoj aŭ en la originaj lingvoj de la studentoj.

Ni havis la plezuron ĝui la muzikajn talentojn de Marie LIEBY, kiu muzikis per diversaj instrumentoj, kornemuzo, gitaro, flutoj.

Ankaŭ ŝia voĉo ravis la aŭskultantojn, ĉefe kiam ŝi kantis en Esperanto. Grandegan sukceson ŝi havis interalie pro la kanzono de Jacques Brel: **Ne forlasu min**

Dume, ĉe nia tablo ni povis informi la publikon pri Esperanto per prospektoj, kalendaretoj, diversaj revuoj libroj. Al tio helpis nin s-ino Sûzel Pailhes ĉe la apuda tablo.

Apud nia tablo deĵoris sinjorino Sûzel PAILHES, aŭtorino de la libro pri la katedralo de Strasburgo. Ŝi prezentis per flagoj la 12 lingvojn en kiuj aperis aŭ aperos la libro.

Baldaŭ aperos la eldonoj en la franca, ĉina, itala, poste en la franca, pola, portugala.



Marie Lieby kantas kaj muzikas kun aliaj studentoj de la Universitato.

Samokaze ŝi estas propagando por Esperanto.



KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2013-2015

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono
2013	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2014	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2015	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Pagebla al

André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Ĉekoj je la nomo de: Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg.

La pagintaj membroj de Mulhouse-Espéranto trovos en ĉi-tiu numero la finanĉan raporton por la jaro 2012.

Verdaj fadenoj por amike babili nur en Esperanto

En 2012 la verdaj fadenoj havis bonan sukceson. Ili regule okazis laŭvice en Mulhouse kaj en Saint-Louis, plej ofte en la lasta lundo de la monato.

Ili ebligas renkontiĝi en restoracio por kune amike babili sen **krokodilado**. Kiam ili okazas en Saint-Louis ni havas ankaŭ la plezuron akcepti membrojn el la proksima Bazela Grupo, kun kiu ni kunlaboras por eldoni nian bultenon Sud-Rejna Kuriero. Pro la diversaj festoj en decembro, ni iom paŭzis.

En 2013 ili denove funkcias kun eĉ pli da sukceso. La 28an de januaro estis 10 partoprenantoj. La diskutoj okazis en gaja kaj amika etoso. Bertrand trovis en revuo tutan bobenon de verda fadeno. Finfine evidentiĝis, kiuj estas la prizorgantoj de tiuj fadenoj.

Venontaj fadenoj okazos

29an de aprilo en Saint-Louis

27an de majo en Mulhouse

24an de junio en Saint-Louis



Verda fadeno :



La lokoj estas:

En Mulhouse:

en la kafejo: 7 rue du printemps

En Saint-Louis:

en restoracio: de la Poste, 10
rue de Huingue.

73a Regiona Staĝo de Esperanto

esperanto
France-Est

la 15 / 16 / 17-ajn de marto
2013

En la Domo Centre d'Accueil
55220 BENOÎTE-VAUX

Organizita de **Groupe Espéranto Meuse**

La ĉi-jara regiona staĝo de Esperanto France-Est estis organizita de GEM "Groupe Espéranto Meuse" dank'al la iniciatoj de François-Xavier Gilbert. La unuaj provoj estis ĝin organizi en suda Alzaco, sed malgraŭ multaj klopodoj de Roberto, ne eblis trovi taŭgan ejon en la dezirataj datoj.



Tial oportune venis la propono ĝin okazigi en Benoîte-Vaux fare de GEM. Tie troviĝas tute taŭgaj salonoj, manĝejoj, ĉambroj por akcepti la partoprenantojn de la 63a staĝo de Esperanto.

Granda salono estis tre oportune metita je la dispono de la libro-servo kaj vespere ĝi povis akcepti la spektantojn

de la distraj vesperoj.

Vendrede vespere Catherine Kremer kaj Lidja Bloch prezentis sian projekton pri vojaĝo al Rumanio, kiu povos okazi en aŭgusto 2013 tra diversaj vizitindaj regionoj kun loĝado ĉe la loĝantoj en vilaĝoj.

Sabate matene estis proponita vizito al la urbo Saint-Mihiel, kie troviĝas abatejo konstruata de la 11a ĝis la 18a jarcento. Tie eblis admiru verkojn de la fama skulptisto Ligier Richier, *La perdo de konscio de la Virgulino*.

La grupo vizitis ankaŭ la preĝejon Saint-Etienne de la 16a jarcento kun aliaj admirindaj skultaĵoj de Ligier Richier, *La entombigo*.



La posttagmezo komenciĝis per prezentado de novaj libroj fare de Jean-Luc, kiu aktive zorgas pri la libro-servo.



La kurson por progresanto gvidis Edmond Ludwig kun deko da lernantoj.

Anne Jausions prelegis pri la originala literaturo en Esperanto. Plej unue ŝi deziris ekkoni la publikon kaj ekscii, kiujn librojn en Esperanto la partoprenantoj jam legis.

Ŝi prezentis aŭtorojn laŭ diversaj skoloj kaj por pli bone montri iliajn stilojn, ŝi proponis al iuj partoprenantoj laŭvoĉe legi kelkajn tekstojn. Tiel ŝia prelego fariĝis pli aktiva kaj ege interesa, ĝi allogis la homojn reveni dimanĉe matene.



Edmond Ludwig enkondukis la vesperan programon. Li deziris danki al nia redaktoro Pol Denis, al Anne Jausions, nia prelegantino. Poste li prezentis Marie Lieby, kies talentojn li rimarkis en la universitato en la kadro de poeziaj vesperoj. Intertempe ŝi eklernis Esperanton kaj sukcesis eĉ kanti en la lingvo okaze de festo de la lingvoj en la universitato de Mulhouse.



La kulmino de la vespero estis efektive la koncerto de Marie. Pluraj muzik-instrumentoj jam troviĝis sur la scenejo, gitaro, kornemuzoj kaj diversaj flutoj.

Marie alterne uzis ilin. Per la flutoj ŝi interpretis konatajn melodiojn, kiel *"La leono mortis ĉi-vespere"*. Ŝi ofte klarigis pri la instrumentoj kaj ties deveno. Uzante la gitaron ŝi kantis belajn kantojn en Esperanto kaj la publiko ĝuis ŝian belan voĉon. Kelkfoje ŝi eĉ sukcesis krei aŭtomatan gitaran akompanon, dum ŝi uzis alian muzikilon. Aparte plaĉis la kanto de Jacques Brel *"Ne forlasu min"*.

Entute la publiko malkovris novan talenton kaj ege entuziame aplaŭdis ŝin. Multan dankon al

Marie.



Ĉe la fino de la staĝo Edmond ne forgesis danki al la diversaj kontribuantoj kaj organizantoj por la sukceso de tiu staĝo. Dume Ursula kaj Inge prezentis la programon 2013 de Bavelo.



Fotoj kaj raporto de Andreo

Marie LIEBY : Nova esperantlingva artistino

Post nur kelkaj monatoj da lernado, Marie LIEBY decidis kanti ankaŭ en Esperanto. Post deko da jaroj da muzikado kaj kantado en la PIERRE SPECKER BAND', famkonata ensemblo en Alzaco, ŝi decidis sin prezenti soloe. Jam dum la internaciaj poeziaj vesperoj en la universitato de Mulhouse, Marie kutimis



agrabligi la interpoemajn paŭzojn per ludado per plej diversaj instrumentoj. Krome, sin akompanante per gitaro, ŝi kantis en diversaj lingvoj. Inter ili Esperanto !

Ŝia unua pli ol unuhora spektaklo ravis la partoprenantojn en la printempa staĝo de ESPERANTO FRANCE-EST en Benoîte-Vaux, apud VERDUN, komence de Marto. Antaŭ la spektaklo ŝi plej zorge agordis la mem kunportitajn amplifikilojn kaj inter la ravaj kantoj Marie plej lerte muzikis per diversaj kornemuzoj kaj flutoj.

Tondra aplaŭdado kaj biso estis la danko de la spektantoj, kiuj ege aprecis la belegan voĉon, la klaregan prononcadon kaj do la facilan kompreneblon de la kanzonoj. Ni ne dubas, ke ne mankos dungoj en plej diversaj Esperanto-aranĝoj tra Eŭropo.

Kontakto : marie.lieby@hotmail.fr

Nia dissendolisto:

mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr

ebligas rapide informi niajn membrojn pri eventoj aŭ aktivaĵoj, kiuj ne povis esti menciitaj en nia bulteno. Se vi estas membro kaj ankoraŭ ne enskribita en tiu listo, vi povas peti vian enskribon sendante mesaĝon al:

mulhouse.esperanto11@free.fr

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Anne Jausions, nia prelegantino rekomendas jenajn facilajn legaĵojn por progresi en la lingvo



1. MALDIKAJ LIBROJ

Aventuroj en mondo de ŝajnigado, de Jean Cojdo, FEL 2009, 40p. (Pri la spertoj de Afrika intelektulo en la blanka mondo: en Germanio kaj Kanado).

Mi ne estas Mona Lisa, de Júlia Sigmond, eldonejo Bero, Berkeley 2001, 65p.

Afrikanoj kaj mi, de Mirejo Groĵan, eld. MIR, Les Brenets, Svislando, 2009, 30p.

Modernaj Robinzonoj, en la siberia praarbaro, de Teodoro Schwarz, eld. Bero, Berkeley 1999, 49p. (Fuĝo el milita kaptiteco en 1920 per trajno, piedirado kaj flosiloj).

Raportoj el Japanio, de Hori Jasuo (14 etaj volumoj, ĉiu pri la antaŭa jaro, ekde 1997).

2. MEZDIKAJ LIBROJ, NOVELAROJ

Vere aŭ Fantazie, de Claude Piron, Fonto, 3a eldono, 2001, 239p.

Infanoj en Torento, Junuloj en Torento, de Stellan Engholm, Dansk Esperanto-Forlag, 1972 (la dua volumo enhavas 143p)

Arne la ĉefido, rakonto el la vikinga epoko, de Leif Nordenstorm, Kava-Pech 2005, 112p. (Por infanoj, sed ne nur).

Fabeloj de la verda pigo, de Louis Beaucaire, Stafeto, 1981, 110p.

La Bato, de Lena Karpunina, FEL, Antverpeno 2000, 125p.

Geografio de miaj memoroj, de Spomenka Ŝtimec, Pro Esperanto, Vieno, 1992, 140p.

Bildoj el norda lando kaj aliaj rakontoj,

de Sen Rodin, FEL 2006, 359p.

Kolektanto de ĉielarkoj, de Tibor Sekelj, Edistudio, 1992, 117p.

3. TRADUKOJ

Ili vivis sur la tero, ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo, de Maryvonne kaj Bruneau Robineau, Opera eldonejo, 1998, 243p.

Urug, de Hella Haasse, traduko de Piet Buijnsters, IEI, Hago, 2012, 115p. (Amikeco inter filo de nederlanda estro de teplantejo en Indonezio, tiam kolonio de Nederlando, kaj Urug, filo de enlanda intendanto).

Sonĝo de kristalo, Arko, 2064, de Jérôme Leroy, tradukita de Armela Le Quint kaj Ĵak Le Puil, Eldona Fako Kooperativa de SAT, 2010, 87p. (eta formato: Mondo renversita konsekvence de la klimataj katastrofoj kaj la nehumana malindustriigo)

Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinci, de Hans Ulrich, esperantigis Benata Hengstmengel-Koopmans (ND), ilustraĵoj de Miroslava Tomečková, Kava-pech, 2008.

4. BILDSTRIOJ

Tinĉjo (tri volumoj disponeblaj).

La sekreto de la arbaro de Lascaux, Felix et Bigotto, eld. Dolmen, 2010, 48p.

Paul Harris, pioniro de nova mondo, de Laurent Dareau, Rotary Club Spa-Francorchamps, Stavelot (Belgio), 2009, 79p. (Pri la kreinto de Rotary).

Vitarue

En 2012 nia asocio sukcesis partopreni tiun simpatian manifestacion dum 10 sinsekvaj dimanĉoj. Alterne deĵoris pluraj niaj membroj de la 10a30 ĝis la 12a30.

Ni traduku "Vitarue" per ĝu-vivu vian straton.



Yves refoje proponas ĉi-jare al nia grupo Mulhouse-Espéranto partopreni ĉe **Vitarue** por informi pri la lingvo kaj babilo kun la homoj pri ĝi.

Ĝi ekos dimanĉe la 26an de majo, kaj daŭros ĉiujn dimanĉojn ĝis la 28a de julio. Lastjare ni ĉeestis kelkfoje, ĉiu-foje kun du aŭ tri personoj, deĵorante en ĝoja etoso. Ankaŭ en unu aŭ alia dimanĉo ni piknikos sur la herbejo.

Se vi volas pasigi agrablan matenon kun ni, babilo en Esperanto, renkonti multajn homojn, ne hezitu, venu !

La manifestacio okazos de la 10a30 ĝis la 12a30, antaŭ la tagmanĝo sur la herbejo. Se vi deziras resti kaj surloke tagmanĝi, ne forgesu kunporti viajn piknikaĵojn, ĉar nenio estas aĉetebla aŭ vendebla.

Du dimanche 26 mai au 28 juillet 2013, un rendez-vous est donné tous les dimanches matins (à partir de 10h30) sur les berges de l'Ill à Mulhouse.


Vita-Rue s'adresse aux personnes souhaitant commencer leur journée dans la

convivialité et le bien être. A travers l'initiation et la découverte d'activités physiques et d'expression artistique, c'est l'occasion de tisser des liens avec ses voisins, sa famille et ses amis.

C'est l'opportunité de passer un moment privilégié et de faire de nouvelles rencontres dans un cadre agréable et verdoyant en oubliant tout rapport à l'argent puisqu'oublier son porte-monnaie est même recommandé !



Por atingi la lokon kaj nian deĵorejon eblas parki sur parkejo de la glitkurejo kaj poste atingi piede Vitarue. Sed estas pli oportune parki sian aŭton ĉe la alia flanko de la rivero ĉe la ĉina ponto. Ĉefe se necesas kunporti piknikan tablon, sakon, materialon. Jen la koordinatoj: 47° 44' 6.11" N 7° 19' 21.95" E



Estontaj planoj kaj proponoj por Mulhouse-Espéranto

Jam venis propono de Maria Fournier okazigi nian jarfinan manĝon en ŝia ĝardeno kun vasta tegmentita ŝirmejo. Ŝia edzo, Eugène proponas al ni sian specialaĵon: nome frititajn karpojn.

Maria loĝas en suda Alzaco, en Sungau en la vilaĝo Hindligen sude de Danemarie. Ni kunvenos ekde la 17a, vendredon la 14an de junio 2013. La tuta manĝo kun aperitivo kaj trinkaĵoj je 15 eŭroj. Ni sendos informojn per la reto.

Nia grupo organizos ĉi-jare la Zamenhof-feston la 14an de decembro 2013. Jacques proponas ĝin organizi en restoracio ĉe Fonderie. Ni kune decidus pri la turisma parto kaj diversaj programeroj.

Yves iniciatis, ke Mulhouse-Espéranto organizu la printempan staĝon de nia federacio en Storckensohn de la 4a ĝis la 6a de aprilo 2014. Li jam rezervis la lokon en la domo "Le Torrent". En venontaj numeroj aperos la detaloj de tiu printempa staĝo.

Ni esperu, ke pluraj membroj kunhelpu por la sukceso de tiuj aranĝoj, por ke ni ĉiuj povu agrable ĝui nian lingvon.

**Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo kaj
invitas vin al la 35a BAVELO-seminario kaj
74a regiona staĝo de Esperanto
en Speyer la 18/19/20ajn de oktobro 2013**

Speyer (latine Spira) jam en la romia epoko estis tre grava urbo, sed sian kulminon ĝi spertis en la mezepoko. La plej okulfrapa daŭraĵo el tiu tempo estas la imperiestra katedralo, ĝi estas la plej granda romanika preĝejo de la mondo, de 1981 agnoskita monda heredaĵo. Krome Speyer havas multajn aliajn vidindaĵojn, kaj dum via vizito vi havos ŝancon vidi unu aŭ alian. Ni aparte rekomendas jenajn:

- Historia muzeo
- Teknika muzeo (kun vaste videbla ŝvebanta "Jumbo Jet" kaj kosmopramo Buran)
- Sea Life (belega prezentado de submara mondo kun interesaj marbestoj)
- muzeo Ŝpira (en mezepoko Speyer havis tre gravan grandan judan komunumon)
- Purrmann-domo (pri lernanto kaj amiko de pentristo Matisse)
- Feuerbach-domo (pri pentristo Anseim Feuerbach)
- Arkeologia montrofenestro (observi arkeologojn dum laboro)
- Elvedriĉe-muzeo (pri petolemaj fabelaj bestoj, kiuj aperas post troa drinkado)



Teknika Muzeo: Boeing 747, kutime nomata „Jumbo Jet”, Ŝvebas super la granda halo. Ĝi estas publike alirebla. Krome videblas la rusa kosmopramo "Buran" kaj aliaj veturiloj ĉiuspecaj.



Ekskursoj: SeaLire - 15€
* nur ĉe antaŭmendo ĝis 30 9 - - 7,50 €
Teknika Muzeo - 14 €
Historia Muzeo de Palatinato- 7€
Urborigardado k. noktogardisto-4,50€
Boatekskurso: 9 €

Kostoj: Aliĝo- 30 €, por junuloj 10€
Du tranoktadoj kaj ĉiuj manĝoj
en kvarlita ĉambro 75,00 €
en du-lita ĉambro 85,00 €

Detalaj informoj kaj aliĝilo aperos en venonta numero de SRK kaj intertempe en niaj retejoj:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Nia Kalendaro 2013

Aprilo 2013	2 - 19	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	9 - 30	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30.
	29	Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en restoracio de la Poste, 10 rue de Huningue en Saint-Louis.
Majo 2013	7 - 22	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a.
	14 - 28	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15 ĝis la 16a30
	26	Vitarue de la 10a30 ĝis la 12a30
	27	Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps" 7 strato du printemps 68100 Mulhouse
Junio 2013	2 - 9 - 16 - 23 - 30	Vitarue de la 10a30 ĝis la 12a30
	4 - 18	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a.
	11 - 25	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15 ĝis la 16a30
	14	Komuna fest-manĝo ĉe Maria Fournier en Hindligen, ekde la 17a. Proponita menuo: frititaj karpoj .
	24	Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps" 7 strato du printemps 68100 Mulhouse
Julio 2013	7 - 14 - 21 - 28	Vitarue de la 10a30 ĝis la 12a30

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Vintro en suda Alzaco

